N I A V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º, 28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
APRILO 1996

***KOTIZO POR 1996 KUN DONACO***

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj* ***kvar*** *jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin* ***sendi ĉekon po 2.000 PTA****, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL.*

Pro la altiĝo de la procento pagenda al banko NI PETAS AL MEMBROJ KIUJ PAGIS PER BANKO KE ILI PAGU PER ĈEKO ***Se vi pagas rekte ĉe la Liceo (lunde vespere) vi ricevos kiel donacon, la libron "Historia del Esperanto en Madrid"****, dulingva versio verkita de Lupe Sanz Bueno.*

**SELTEN EN MADRIDO**

Antaŭ iri al Murcio P-ro Selten prelegis en la Madrida Universitato. La Prezidanto de MEL salutis lin kaj donacis turismajn broŝurojn pri Madrido kaj la hispanan tradukon de la libro "Esperanto fenómeno de la comunicación".

**FUNDACIÓN ESPERANTO**

La patronaro de la FE kunvokas tradukan literaturan konkurson. Ĝi temas pri la 2a Premio Inés Gastón por tradukoj el noveloj de hispanaj aŭtoroj vivantaj en la 20a jarcento. Lim-dato ĝis 30an de septembro. Premio 15.000 ESP en E-libroj (Pli da informoj en Boletín nº 324)

**SENPAGA EKZEMPLERO DE "HEROLDO"**

Oni povas senkosta ricevi la printempan duoblan numeron de "Heroldo de Esperanto" kiu enhavas detalan liston de ĉiuj gravaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto ĉie en la mondo. Petu al: Via N. Sandre 15. I-10078 Venaria R. (Torino). Italio

***HEF ANGULO*** *(Ne oficiale)*

Pro la translokiĝo de Pedro Garrote al Valladolid, la enkomputiligo de la kontoj de HEF estos farita de Maritzsa Graziani kun la helpo de Ana Manero. Dum unu semajno Pedro instruis ilin en Madrido pri la kontaj teknikoj. Ĉe HEF-CO, aparte de la normalaj kontoj de HEF, ekde tiu-ĉi jaro oni kontrolas la abonoj de "Eventoj" kaj ankaŭ la UEA-Hispana Delegacio (kotizoj de UEA, revuoj pagota al UEA, aliĝoj al UK, ktp.). SUKCESON AL LA NOVA TEAMO!

(El "Valencia luno" nº 42) Estas intenco de HEF krei delegitan reton kun la celo starigi kontakton pere de ĝi, inter HEF kaj la membroj kaj asocioj mem, por plibonigi ĝian funkciadon, kaj helpi disvastigi informojn pri Eo ĝenerale, kaj pri HEF konkrete. Dua celo estas helpi la novan lanĉitan kampanjon por atingi entute 1000 membrojn, kio, inter alie, rajtigus al HEF havi 2 komitatanojn en UEA. Voluntuloj por esti delegitoj kontakti la novan direktoron de HEF, Augusto Casquero.

**HISPANA-ESPERANTA VORTARO**

La afero de la poŝvortaro "bruliĝas". Liceo oferis tekston, jam informatiziita kaj verkita de Luis Ojer, por komenci la laboron (kompletigon kun aliaj tekstoj kaj korektadon). Miguel G. Adúriz proponas vortaron bazitan en la vortarego de De Diego. Valencia Grupo montras sian deziron kontribui en iu ajn eldono. Libroservo jam ne havas ekzemplerojn. La eldonejo Sopena proponas vendi eldonrajton al esperantistoj...La estraro de HEF ankoraŭ ne parolis pri tio. La solvo.... eble dum la 7-a kongreso de Valencia Esperanto-Federacio kaj Murcio, la 27-an de aprilo en El Puig, apud Valencio.

Por plani eblan eldonon estas konvene scii, proksimume, kiom da ekzempleroj aĉetas jare ĉiuj esperantaj grupoj kaj kiom da stoko ili havas nun: **Bv. sendi vian kalkulon al Madrida Esperanto-Liceo.**

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**


7a Kongreso de Valencia-Murcia Esperanto Federacio. El Puig (Valencia) 27-28 aprilo
**Prelegos Miguel Fernández "Mauro Nervi: Poeto ĉe havenoj"**
48a Kongreso de IFEF. 11-18 majo Hago (Holanda)
81a Universala Kongreso de Esperanto. 21-28 julio Prago (Ĉekio)
**VALENCIA ESPERANTO-GRUPO ORGANIZAS DU KARAVANOJN AL PRAGO, unu per aŭtobuso al Poprad kaj Praga, kaj alia per aviadilo nur al Praga, je tra favora prezoj kaj kondiĉoj. Petu informojn (96) 384 96 16**
55a Hispana Esperanto Kongreso. 19-23 julio. Murcio

**HISPANIO**

La urbestraro de **Zaragoza** aprobis ke centra ĝardeneto estu nomata "Glorieta del Esperanto".

La grupo "Frateco" de **Zaragoza** ricevis de la vidvino de José Olavide, kuracisto kaj aktiva membro de la grupo, forpasinta en 1993a, esperantan bibliotekon kun pli ol 3000 libroj

**Valencia** Esperanto Grupo organizos E-kurson (20 horoj) en la Filologia Fakultato se aliĝas minimume 20 gelernantoj. La kurso donos po du universitataj kreditoj. Kosto: 6.000 ESP por universitatoj kaj 9.000 por aliaj. Ankaŭ la Valencia Grupo eldonis poŝkalendaron 1996 kun adresoj de la grupo kaj de HEF-CO. Ni sugestas ke en venonta eldono, la 14-an de Aprilo ne la 15-an de Decembro aperu en verda koloro.




Desegno de Joaquín Martín

Finfine la laboro kaj klopodoj de José Luis Peréz Óvilo kaj aliaj murciaj esperantistoj sukcesis, la Nobel-Premiita Selten prelegis en **Murcio**. La ferma prelego estis en Esperanto, laŭ traduko al la hispana de A. Alonso, kaj en la biografia resumo de Selten, inkludita en la oficiala programo, aperis du paragrafoj pri esperantaj aktivaĵoj de la fama ekonomiisto. La rektoro de la Murcia Universitato intervjuis ĉe "Tele Cinco" al Selten en Esperanto, HEF-presidanto tradukis al la hispana. Murciaj ĵurnaloj publikis diversaj artikoloj pri la seminario menciante kutime esperanton, kelkaj el ili estis suskribita de J.L. Pérez Óvilo. GRATULOJN AL ESPERANTITSTOJ DE MURCIO PRO LA SUKCESON!

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Prelegoj** dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.

15a de aprilo. "Voĝajo al Líbano". J.C. Ruiz
13a de majo. "La nura kaj ĉiutempa anarkiismo". L. Ojer
10a de junio "Madrido ekde la ĉielo" L. Sanz

**Kursoj**: Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18
Liceo. Lunde kaj merkrede 18.00 19.30. Atocha 98.

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal